Foto de Adam Wilkus

Krakovo mem estas luksa! Ĉiuj tuj rimarkas, ke la urbo havas ĉarmon kaj propran etoson, kaj ke necesas pli da tempo por viziti ĝin... do ili revenas... Ankaŭ ege allogas la minejo en Wieliczka — mondunika, kun artaĵoj skulptitaj en salo-ŝtonegoj!

Pri tio, ke Krakovo havas buntan, firman kaj diversaspektan E-agadon, ne necesas konvinki iun ajn! Nek pri tio, ke ĝi estas sidejo de la pola sekcio de ILEI.

ilei

WYŻSZA SZKOŁA ZARZĄDZANIA I BANKOWOŚCI W KRAKOWIE

LA 42A KONFERENCO DE ILEI

La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado

17-25 de julio 2009

Krakovo, Pollando

Foto de Adam Wilkus

Venu konferenci EN LA PLEJ FAMA POLA URBO,
Eŭropa Kultururbo, Krakovo!

POR LA PROGRAMO NI ANTAŬVIDAS:

- Interkonan manĝvesperon
- Solenan Inaŭguron
- Simpozion laŭ konferenca temo
- Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj
- Seminarion de E@I
- Seminarion de *lernu!*
- Seminarion de InterKulturo
- Apartan programon por universitataj instruistoj
- Kunlaborsesiojn kun AIS kaj ISAE
- Laborgrupojn laŭ diversaj temoj
- Kelknivelajn lingvajn kursojn
- Programerojn por instruemuloj
- Studrondon pri E-literaturo
- Prelegojn de partoprenantoj
- Riĉan ekskursan programon
- Buntan kaj varian kulturan programon
- Distran programon ĉiuvespere

Foto de Adam Wilkus

Ni konferencos en E-ejo: la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo, en kiu oni jam instruis E-on kaj en kies oficiala strukturo aktivas Studenta E-Rondo (unu el du oficialaj en Krakovo kaj Pollando). La Lernejo iĝis partnero de ILEI por la konferenco en 2009.

Foto de Adam Wilkus

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj aperos en Internacia Pedagogia Revuo (IPR) kaj en retpaĝo de ILEI www.ilei.info. Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn, Vi ĉiam estas bonvena **skribi** al:

Aida Čižikaitė aidute@mail.lt (ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj **Małgorzata Komarnicka** margareta.ilei.pollando@gmail.com (ĉefa loka organizanto).